Saluton, karaj miaj geamikoj,
Mi jxus revenis hejmen, post ege longa foresto. Fakte mi revenis Rumanion pasintan semajnon, sed mi profitis la feriajn tagojn okaze de Ortodoksa Pasko por viziti mian patrinon, kiu logxas sude de Bukuresxto...Cxu vi memoras pri mia popolkostumo de suda Rumanio, kie mi naskigxis?
Ke vi plu memoras aux ne pri mi...tion mi ne certas!!! (mi sxercas, kompreneble).
Sed certe mi konservos belegajn memorajxon pri mia prelegturneo!
Ne nur cxar mi vizitis tute nekonatajn por mi regionojn de Francio...sed ankaux pro la renkontigxo kun mirinde afablaj kaj gastemaj personoj (se ne estus ege longa listo, mi skribus cxiujn nomojn).

Nun mi bezonas iom da tempo por ordigi cxiujn memorajxojn, kiuj nuntempe kirligxas en mia kapo...sed vi ja konstatis kiom da centoj de fotoj mi faris por helpi mian memoron...

Mi sxatus danki al cxiu inter vi, cxu al zorgemaj gastigantoj, cxu al informricxaj cxicxeronoj, cxu al partoprenantoj en la konferenco, kiuj "bombardis" min kun interesaj demandoj...sed mi ne havas la tutan liston de la ret-adresoj.
Pro tio mi petas la gvidantojn de cxiuj kluboj transdoni miajn varmkorajn kaj sincerajn dankojn.
**Mi dankegas al vi, kara Yves, ke vi ebligis al mi tiun viziton.**

Restas valida mia invito por viziti Rumanion, Brasxovon...kie atendas vin same gastemaj esperantistoj, allogaj vidindajxoj kaj interesaj E-arangxoj pri kiuj mi plezure informos vin.
Mi petas, nur se eblas, sendi al mi la liston de pluraj ret-adresoj por ke ni restu en kontakto.

Ege amikajn kisojn al vi, cxiuj,
Rodica

PS Mi pardonpetas al cxiuj amikoj kies retadreson mi ne havas(aux mi ne trovas nun), kaj pro tio mi ne povas danki al ili persone.

<rodica_todor@yahoo.com>